

& Mortinto:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 377 paŝoj dum 6 minutoj. Poemon verkis Frigyes Karinthy. Baladigis Martin Strid per melodio kaj rekantaĵo de Balado de Virgar, Norda Kantaro #4406.>

(#Melodio:

<1,3:29> (

a;La /MiiLaLa LaaTiTi Tiidodo doore;re reedodo dooTiTi TiiMi;Mi LaaLaLa TiiTiTi TiiTiTi doore;re reedodo dooTiTi LaTi;

(#Rekantaĵe: do TiLa So Ti Mi LaTi do do;Mi So SoFa Mi La;Ti doTi La)

)×13)+

(&Strofoj:

'1 Vi/vanton per frukto regalas somero,
; Per vino regalas la vintro. ; Sed scias
mi, kiel mortinto sin nutras: ; Per
larmoj sin nutras mortinto.

(×:; **Nun emas mi en danco jam iri ;
dum rozoj, lilioj ; kreskadas tre.**)

'2 Jes. Kuŝas mortinto sur fundo de
tombo, ; Kie estas nek frostoj, nek
varm', ; Vizaĝ' lia flavas, okul' lia
kavas, ; Li kuŝas, atendas je larm'.

'3 Kaj kuŝas, atendas: ĉu iu jam
plendas, ; Kaj kuŝas, atendas sub humo.
; Nek dankon li konas, nek petis, nek
donas, ; Lin logas nek sun', nek
lunlumo,

'4 Nek memor', nek esper' nek fora
pejzaĝo, ; Nur la griza larmsuko,
grandkvante. ; Kiam krakas la branĉoj
kaj zumas la arboj, ; Kaj spasmas la
gorĝo pulsante.

'5 Kiam ŝmacas la tero, vekigaŝo silento,
; Sekigaŝo la ostoj en kaŝo, ; La ostoj, la
krudo, atendas je l' nuda ; Barakta,
vivanta molaĵo.

'6 Ĉar sciu: se kurbas la buŝo je ploro, ;
Li plezuras kun ĝoja ridaĉ', ; Dum plor'
ne forgesu sub molaĵo vizaĝoj ; Pri l' rid'
malica de l' ostovizaĝ'.

'7 Ho, kiom mi ploris! Jam tede! Per
larmoj ; Mordiĝis la koro en brust', ;
Kiel la supraĵo de aĝa supraĵo ; Per
pigra verdaĵo de rust'.

'8 Mi ploris, kie neniu min vidis, ; En
aĉaj, malpuraj anguloj, ; Ĉar naŭzas ja
min, kaj abomenigas ; Poltrona ploraĉ'
de l' okuloj.

'9 Sed se vi pli volas, nur signu,
mortinto, ; Ne ĉesis festeno, ~~plu daŭras~~
regal', ; Se sekos okule la akvo, mi
donos ; Ja sangon kaj salon, ~~aceton~~ kun
gal',

'10 Disfluos mi larme, sorbiĝos en
teron, ; Se tion vi volas, mortinto, ; El
ter' mi vin lavos, el ter' vin elfosoj, ;
Elvolvos mi vin el tol-vindo,

'11 Kaj kun vi ekiros la larmo-rivero, ;
Ekŝvelos malpure la flu', ; Tra l' mur'
kaj tombar' la rivero sovaĝa ; Inundos,
galopos ĝi plu.

'12 Denove diluvo englutu la teron, ;
Ne restu insulo sen mergo, ; Kaj supre
de l' akvoj, sur ŝaŭmo de l' akvoj ;
Arke' de Noah': via ĉerko!

'13 Mortint', ho mortint', vi, patrin',
amatin', ; Edzino, infano, homfrato! ;
Elpaŝu el barko kaj sendu mesaĝon, ;
Kiam bordos vi sur Ararato.)